Caroline Keppel,

## Sen la karul'

*tradukita de Adela Schafer*

Ĉio tedegas min -
forestas li!
Ĉio malplaĉas nun
sen simpati'.

Ĝojo kaj feliĉec'
forflugis pro tedec';
ho, mi ploregas nun
sen la karul'.

Ĝaje moviĝis mi
en la dancad';
kun li koncervesper'
estis ĝuad'.

Sed post la ekforir'
regadis min dezir',
kaj sopiradis mi
al la karul'.

Min, kruelulo , nun
ne amas vi!
Kial forflugis jam
korsimpati'?

...

Caroline Keppel,

## Robin Adair

What's this dull town to me
Robin's not near
What was't I wish'd to see
What wish'd to hear

Where all the joy and mirth
Made this town heaven on earth
Oh, they're all fled with thee
Robin Adair

What made th' assembly shine
Robin Adair
What made the ball sae fine
Robin was there

What when the play was o'er
What made my heart so sore
Oh, it was parting with
Robin Adair

But now thou'rt cold to me
Robin Adair
But now thou'rt cold to me
Robin Adair

...

Lin eĉ en malesper'
nur amas mi sur ter',
kaj restas kun mizer'
sen la karul'.

*Traduko de la Angla poemo "Robin Adair" de* Caroline Keppel *(*1734 – †1769) en Esperanton de Adela Schafer.*

*Arg-1025-2078 (2014-05-28 13:34:56)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio, sur la paĝo 50 kaj 51. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Tie estas, verŝajne erare, indikite, ke la origina angla-lingva teksto estas verkita de la skota poeto Robert Burns.*

Yet he I loved so well
Still in my heart shall dwell
Oh, I can ne'er forget
Robin Adair

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* Caroline Keppel *(*1734 – †1769).*

*Arg-1025-2077 (2014-05-27 15:55:44)*

*La teksto de tiu ĉi kanto troviĝas en* http://www.traditionalmusic.co.uk/folk-song-lyrics/Robin_Adair.htm*. Pri Robert Adair vidu la retejon* http://en.wikipedia.org/wiki/Robert_Adair_(politician)*. Legu ankaŭ:* http://www.lookandlearn.com/blog/2482/lady-caroline-keppels-sad-love-song-immortalised-young-robin-adair/*. Vidu ankaŭ:* http://www.bartleby.com/360/3/74.html*. La kanto estas aŭdebla en* http://www.youtube.com/watch?v=51cI0_exnLU*.*